

**Alegoria sfero:** alegoria temo (enhavo): la aŭtoro rakontas la historion de Galipuletoj kaj Hurluberloŝoj, sed la legantoj komprenas, ke temas pri Francoj kaj Germanoj, kiuj proksimiĝas al la Unua Mondmilito – kvankam loko kaj tempo ne estas precizigitaj; figuroj homaj, alegoriaj, "kolektivaj"; Poliŝinelo plenumas la rolon de komentanto: li klarigas la alegoriajn aludojn kaj situaciojn, kaj senmaskigas la intencojn de aliaj personoj; multaj nomoj enhavas kaŝitan sencon; ironio aperas ĉiunivele; ĉio estas inversigita.

La averto de *Romain Rolland* adresiĝas al la popolo. Lia pesimismo montras, ke la alvoko ne estas aŭdita.

## Notoj

- (1) PEPIN Jean: "La Tradition de l'allégorie de Philon d'Alexandrie à Dante". *Etudes augustiniennes, série "Antiquité"*, 1988, p. 251-252
- (2) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 66
- (3) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 34
- (4) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 32

## Adreso de la aŭtoro

Dr. Nina KORJENEVSKAJA-GOURIOU  
Bat. C, L'Espiguette,  
rue de Verdun  
FR – 13140 Miramas  
FRANCIO

<nina.gouriou@wanadoo.fr>  
tel. (33)-4-90-58-37-77 (el Francio: 04-90-58-37-77)

## Priaŭtoro informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologio kaj slavaj studoj. Ŝi laboris en Baŝkiria Ŝtata Universitato kiel docento ĉe la katedro de la historio pri eksterlanda literaturo kaj tutmonda artkulturo.

D-rino *Korjenevskaja-Gouriou* estas Orda Profesor(in)o (OProf.) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino kaj instruas okcidentan literaturon de la XX-a jarcento kaj historion de arta kulturo.

De 1993 ŝi loĝas kaj laboras en Francio, kie ŝi instruas la rusan lingvon kaj kulturon.

## Scienca elio

### Por 2004 kronita "birdoreĝo"

La troglodito (*Troglodytes troglodytes* – germane: "Zaunkönig") estas la elektaĵo de la germana Naturprotekta Asocio (NABU) kiel "la birdo de la jaro 2004". Kvankam la ekzistado de tiu senpretenda, malgranda kaj modest-aspekta birdo kun la laŭta voĉo ne estas aktuale endanĝerigita, ĝi tamen – por ke tio tiel restu – bezonas por sia postvivado, laŭ NABU, striktan konservadon de nedifektita naturmedio. La ruĝbruna mallongvosta "birdoreĝo" estas mallerta fluganto – ĝi preferas hopeti. La laŭtsona kantado de la trogloditmasklo povas penetri al niaj oreloj ĝis 90 decibeloj (= internacia mezurunuo de sonintenso) – kaj kun tio atingas la mezurnivelon de eĉ pezkamiona trafiko... (Fotono: "Werra-Rundschau", 2003-10-11)

### Iom pri arktaj ursoj

La blankaj ursoj migradas dum sia tuta vivo, ĉiun tagon (escepte kiam ili restas aŭ dormas): de la suda pinto de Gronlando supren laŭlonge de la orienta marbordo, preterire la nordan poluson, transe al Siberio, poste pluen al Alasko. De tie, trans inter la insuloj troviĝantaj antaŭ Kanado, reen al suda Gronlando. Tiajn enormajn distancojn ili ĉiam trapasas de oriento okcidenten – ĉar ili ja migradas kune kun la glacio, sur kies bankizoj ili vojaĝas. La vintron ili travivas dormantaj. Komence de novembro la arktaj ursoj enfosas sin en neĝkavernon kaj iĝas enŝlositaj de neĝamasoj. La propra varmeco de la urso ekvilibriĝas je korpotemperaturo iom super 0° gradoj de Celsio – eĉ la plej akra ŝtormo ĝin ne povas atingi kaj ĝeni. Kiam en marto la urso eliĝas el la dumvintra neĝloĝejo, ĝi estas tiom magra, ke la homoj en la nordaj regionoj longan tempon kredis, ke ekzistas du specioj de blankaj ursoj. (2003-11-04)

### Araneo – modelo de perfekteco

Aranea silko estas malpli rompebla ol nilono kaj eĉ ŝtalo, sed la plej granda parto de la – sole en Germanujo! – ĉ. 1000 araneaj specioj tute ne plu interesiĝas (post produktado, uzado kaj forlaso de la kaptoreto) pri tiu ĉi grandega valorajo.

Escepte de la kruc-araneo. Tiu ĉi specio efektivigis la plej aĝan recikladon de la mondo. Anstataŭ lasi simple malkomponiĝi la malnovan hejmon, ĝi, antaŭ la transloĝiĝo, simple formanĝas ĝin. La aranea fadenajo konsistas el fibroinoj, t.e. proteinoj, kiuj estas pliriĉigitaj de la araneo mem. Ĝia metabolo jam duonan horon post vorado de la delikata substanco ree disponigas pri 80 ĝis 90 procentoj de la fibroinoj – por la sekva repletekta agado. La kruc-araneo, do, estas senekzempla modelo de perfekteco. (2003-07-09)